Protokolo de la kunsido de la Subtena Sektoro de AIS okazinta dum SUS 28 en Karlovo (BG) je 2005-08-21, 16:15–17:15.

1) Formalaĵoj. Ĉeestas la subtenaj membroj Borzikov (por Info/Rutenia), Fössmeier, Frank (ankaŭ por IfK). Lobin, Poláková (por TAKIS kaj SAIS); do sep membroj estas reprezentataj. Bedaŭrinde ne ĉeestas estrarano. La kunsidon gvidas AIS-prezidanto OProf. Frank.
2) Raportoj. SubS bedaŭras, ke OProf. Wickström nek kiel AIS-trezoristo nek kiel SubS-estrarano raportis nek delegis tiun taskon. Senŝarĝigo de la estraro pro tio ne povas okazi. SubS aprobcele postulas de AIS-D finkalkulon pri la buĝeto de 2004, antaŭ pludono al la impostofico.
3) Valoro de AKU: La valoro de la Aku restas 65 eŭroj.
4) Ĝis efektivigo de kontrakto pri Acta Sanmarinensia inter SubS, la scienc-ofico de AIS kaj fidinda eldonejo SubS ne donos plian subvencion por Acta Sanmarinensia.
5) SubS pagas la novan libron de Selten/Frank por ĉiuj dumvivaj subtenaj membroj. La restantaj rezervoj el 2004 iru egalparte kiel subvencioj al la klerigejoj en Karlovo, Komárno kaj Sibiu.

Kunsidgvidanto: *OProf. Dr. habil. Helmar Frank*
Protokolanto: *OProf. Dr. Reinhard Fössmeier*